

# BULTENO

GERMANA  
ESPERANTA  
FERVOJISTA  
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung  
deutscher Eisenbahner-Esperantisten



Fondita 1952


Numero 3

Junio/Julio/Augusto 1970

## Kora invito al Darmstadt

Riĉenhava estis la oferto de Esperanto-aranĝoj dum la pasintaj monatoj. Certe ankaŭ la GEFA-anoj eluzis unu aŭ plurajn okazojn de renkontiĝo inter esperantistoj. Tamen unu tradicia aranĝo ankoraŭ ne okazis: la 14 a jarkunveno de la Germa-

na Esperanta Fervojista Asocio (GEFA). Ĝi estos organizata de la distrikto Frankfurt en Darmstadt inter la 10a kaj 11a de oktobro 1970. Al la loko de la GEFA-jarkunveno estas dediĉita la sekva artikolo. La redakcio



Darmstadt nia jarkunvenurbo 1970

Jes, Darmstadt valoras vian viziton, egale ĉu vi venas el relativa proksimeco aŭ ec el eksterlando. Ne senkaŭze ĝi portas la nomon „grandurbo meze en arbaro“. Kvazaŭ urbokoro estas la anglastila parko Herrengarten apud la rezideja palaco kaj proksima al la GEFA-kongresejo. Apude situas la Prinz-Georg-ĝardeno, kies geometrie aranĝitaj bedoj esprimas la dekoraman percepton de rokoko. Amikoj de

franca ĝardenarkitekturo preferas la cirkelo-simetrian organĝeriparkon. Tie promeni estas ĝuo ankoraŭ dum oktobro. De Darmstadt kondukas la vojoj rekte al la regionoj Bergstrasse kaj Odenwald, kien veturos la aŭtobuso de nia trihora ekskurso. Trapasante la arbarojn, buntajn dum la aŭtuno, ni troviĝos sur historiĉa tereno. La Romanoj konstruis siajn limfortikaĵojn. Laŭ la sageo de la Nibelun-



genepopeo Hagen mortigis tie la ĉefheroon Siegfried. Pri la regiona historio atestas ankoraŭ kasteloj kaj palacoj ekz. la monaĥejo Lorsch el karolida tempo kaj apud la urbo Darmstadt la ĉaspalaco Kranichstein kaj la kastelo Frankenstein. Ekde 1330 Darmstadt posedas urbajn rajtojn. Kiel rezidejo de la heslandaj grafoj la urbo akiris gravan pozicion. La 19a jarcento alportis, post konstruo de la fervojlinio Frankfurt - Basel, prosperan evoluon. Dum la lasta mondmilito estas detruitaj 70 % de la konstruaĵoj. Nuntempe la urbo havas 140 000 enloĝantojn. Apud la kongresejo Liebig-Haus, kiu ĉiurilate estas moderna kaj taŭga konstruaĵo, oni vidas restaĵojn de la urbomuro. Post la milito la lokaj instancoj klopodis konservadi aŭ rekonstrui la barokstilan rezidejan palacon, kelkajn renesancajn domojn kaj la urbodomon. Pri la klasicismo memorigas la Ludoviko-kolono, la Ludoviko-preĝejo kaj la ruino de la Heslanda Teatro. Ludoviko, grandduko per deklaro de Napoleono, donis en 1820 al la urbo propran komun-administradon. La altaĵo Mathildenhöhe fariĝis antaŭ 70 jaroj la centro de la sistemo kaj nun

### Loga semajnfino por gejunuloj

La programo de la GEFA-jarkunveno en Darmstadt planas kontaktkunvenon de niaj junaj kolegoj kun GEJ kaj FFEA-junularo. Tiun seriozan semajnfinan laboron kadrumos vendredon kaj dimanĉon posttagmeze loga amika renkontiĝo en St. Martin kaj Neustadt en pitoreska ĉirkaŭo

kun folkloro evento kaj bongustaj palatinaj specialaĵoj. Oni atendas subvencio de la franca-germana junularfonduso. Rezervu la semajnfinojn 9.—11, 10, 1970 kaj petu programon!

GEFA

Legu en la venonta Bulteno:

denove aktuala stilo „Jugendstil“. Tiu belarto esprimas sin en la edziĝfesta turo. La apuda preĝejo en la rusa-ortodoksa stilo certe allogos la kongresanojn. Oni konstruis ĝin pro la parencaj ligoj kun la cara korto.

La nuntempa graveco de Darmstadt bazas sur ĝia industrio: kemio, maŝinoj, motoroj, farmaciaĵoj. En la teknika altlernejo studas pli ol 5000 studentoj natursciencan kaj konstruadon. Specialaj institutoj havas tie sian sidejon. Muzeoj, ekspozicioj, bibliotekoj kaj altranga teatro atribuas al Darmstadt la rangon de bonkvalita grandurbo.

Certe semajnfina restado ne sufiĉas por informi sin pri ĉiuj vidindaĵoj sufiĉe bone. Pluajn detalojn entenas la urbo-prospekto kun donita teksto en Esperanto. Ĉiu kongresano ricevos ĝin. Filatelistoj havos okazon ricevi specialan stampon. Aparta ekspozicio montras artajn verkojn de niaj kolegoj. Jam nun estas konstatebla granda intereso flanke de la urbaj kaj fervojaj eminentuloj. LKK multe laboras por fari agrabla vian restadon. Vi kaj niaj geamikoj el eksterlando estu kore bonvenaj en oktobro en Darmstadt. W. B.

### Margene pri la 22a

701 fervojistoj kongresis en Rimini!

Por ĉiu kongresano unu ondo!

Rekordnombro dum fakprelegoj!

Majstra improvizado venkis strikonjn!

Inaŭgura bapto en Castel S. Pietro!

„Dopolavoro“ en Roma.

wbr

### Zusammenfassung des Fachvortrags:

#### Die schienengleichen Wegübergänge der italienischen Privatbahnen

in Esperanto verfaßt von Prof. Dr. Ing. B. Lattanzi di Monterubiaglio, Rom; vorgebracht von Dr. De Salvo, Rom, anlässlich des 22. Internationalen Eisenbahner-Esperanto-Kongresses im Mai 1970 in Rimini.

Die 5 200 km Schienenweg, die in Italien von privaten Gesellschaften betrieben werden, haben 10 999 schienengleiche Wegübergänge. In Anerkennung der Notwendigkeit, sowohl den Schienenverkehr zu be-

schleunigen, wie auch den Straßenverkehr zu sichern, entschied sich das italienische Transportministerium für die Verbesserung dieser Übergänge durch automatische Lichtsignale für Schienenweg und Straße in gegenseitiger Abhängigkeit. Die Staatsbahnen bevorzugen dagegen an entsprechenden Wegübergängen automatische Halbschranken ohne bahnsseitige Lichtsignale. Zu Beginn des Jahres 1969 waren in Italien insgesamt 883 auto-

matische Einrichtungen in Betrieb, davon 726 bei Privatbahnen.

Der Vortrag erläutert Bau-, Funktions- und Betriebsgrundsätze der Automatik. Statistische Angaben zu Unfällen an automatisch gesicherten Übergängen lassen erkennen, daß diese ausschließlich durch Unachtsamkeit der Straßenbenutzer verursacht wurden.

Der vollständige Urtext ist bei IFEA zu bekommen. Die deutsche Übersetzung liegt vsl. im August bei GEFA vor.





Verleihung der FISAIC-Goldmedaille an IFEF-Präsident Gießner

## El la grupoj

**Frankfurt.** Nur du semajnojn post la finita IFEF-kongreso en Rimini la grupo povis spekti 20-minutan kolorfilmon pri la kongresaranĝoj en Italio inkluzive la postkongreson en Romo. La filmo de sano Barnickel estos montrata ankaŭ la 11an de oktobro 1970 dum la 14a GEFA-jarkunveno en Darmstadt.

### Köln

Kiel ni nun eksciis, estis denove jubileo en nia distrikto. La 40-jaran datrevenon de ilia esperantiĝo povis festi niaj kolegoj Heinrich Roß el Würselen ĉe Aachen kaj Peter Decker el Hoengen ĉe Aachen.

En la aŭtuno 1928 ili komencis lerni la lingvon. Sekvis kurso por progresintoj kaj poste ili estis la kunfondintoj de la Esperantogrupo Würselen, en kiu

ili funkciis kiel instruistoj. Komence la grupo ankoraŭ estis malgranda, sed en la jaro 1933 oni jam nombris 50 membrojn. Kiel ili rakontis, la iama grupvivo estis tre vigla, kvankam dum la tempo de nacismo parto de la membroj estis persekutitaj. Sekvis policaj traserĉadoj kaj aliaj malagrablaĵoj. Nur sekrete la gesamideanoj povis renkonti sin; parte en arbaroj, herbejoj aŭ malantaŭ arbustoj. El tiu tempo la jubilululoj rakontis jenan historion:

Estis la jaro 1938. Ili staris en la urbocentro de Aachen antaŭ montrofenestro. SA-funkciuloj alparolis ilin pro la Esperantostelo sur la vestaĵo. Nia kolego Decker respondis en la internacia lingvo. Post tio la funkciuloj miregis, kaj fine diris unu el ili: „Amiko, ni iru! Ambaŭ estas eksterlandanoj.“

Rimarkinde estas, ke ili respondas ankoraŭ hodiaŭ kun eksterlandaj geamikoj ek de 1929. En la jaro 1950 vizitis la infanoj de korespondamiko el Skotlando nian kolegon Roß.

Antaŭ la dua mondmilito ili jam renkontis regule eksterlandanojn el la najbara Nederlando kaj Belgio.

Se la deĵoro permesis, ili vizitis la IFEF-kongresojn. Verona, Helsinki, kaj Stoken-on-Trent estas kelkaj el ili.

Ankaŭ niaflanke tutkoran gratulon.

### Jarkunveno de la GEFA-distrikto Stuttgart

La komisiito de la distrikto Stuttgart, Egon Kiefer, invitis por sabato, la 28an de februaro, siajn membrojn al Ulm por partopreni la regionan jarkunvenon. Venis krom la distriktaj fervoj-esperantistoj ankaŭ konsiderinda nombro



noj kaj eĉ eksterlandaj geamikoj. Kun bonvenaj vortoj s-ro Kiefer povis saluti el Bulgario s-inon Dudik, el Parizo s-inon Ballaven, kaj du jugoslavajn aktorojn, kiuj siavice respondis kaj esprimis ĝojon ĉeesti la kunvenon. Sinjoro Brandenburg, la prezidanto de GEFA, estis persone veninta el Münster. La ĉestantojn ankaŭ salutis, s-ro Männer kiel BSW-komisiito por kulturaj aferoj en Ulm.

Ne estis hazardo, ke la apudĉambron de la hotelo „Casino“ plenigis ĉirkaŭ 60 personoj, ĉar al invitoj de kolego Kiefer oni volonte sekvas. Kiel jam ofte li ankaŭ ĉi-foje kvazaŭ lude estris tiun renkontiĝon, kiu estis multvaria kaj interesa kaj krome havis tute familieran karakteron.

## Ni legis por vi

**Informilo de internacia Esperanto muzeo en Wien**  
La biblioteko de IEMW estas uzebla por ĉiuj eŭropaj esperantistoj.

La Internacia Esperanto-muzeo pruntedonas pere de Aŭstria Nacia Biblioteko, A-1014 Wien, Josefsplatz 1, librojn kaj gazetarkolektojn. Ĉiu esperantisto en Eŭropo rajtas iri al iu pli granda publika biblioteko kaj mendi presaĵojn.

**Finnlanda fervojista abstinenc-asocio**

aranĝos inter 2.—9. 8. 1970 junularan semajnon por abstinaj fervojistoj esperantistaj kaj por familianoj de fervojistoj sub aĝo de

Jen iom el la programo: Kantis f-ino Marianne Braun, la „najtingalo el Laupheim“, akompanante sin mem per gitaro.

Kulmino de la renkontiĝo estis la lumbildprelego de s-ro d-ro Breuninger el Ulm, kiu bilde kaj vorte dokumentis sian devigan restadon dum 11 jaroj en Sovetunio kiel sciencista reparaci-deportito. Certe la aplaŭdo kaj la posta vigla diskutado montris al d-ro Breuninger, kiel atenteme ĉiuj sekvis la bonege preparitan prezentadon. Apartan dankon al li. — S-ro Michel Schranz aktivis kiel humoristo, rakontante, kantante kaj eĉ aktorante el sia ne elĉerpebla spritaĵ-trezoro, kaj s-ro Bardehle per sia harmoniko foje instigis por kanti, foje por danci. Malvolonte la grupo

35 jaroj en Kiljava kurso-kaj sportcentro, posedata de Finnlanda Sindikato, ĉirkaŭ 45 km nordokcidente de Helsinko, La programo estos varia kaj distra. La kotizo kun plena pensio kaj kun ekskursoj, nur 50 FM, estas pagebla post alveno en Kiljava. Adreso: Untuvaisentie 4 B 64, Helsinko 82/Finnlando.

**Denove feriosemajno en Nederlando**

La anonco en Bulteno 1/70, paĝo 6, intertempe parte estas nuligita. Nova programo por la aranĝo de la 29a de aŭgusto ĝis la 5a de septembro 1970 en Wezep/Nederlando estas ricevebla kontraŭ respondkupono de s-ro Thies M. Blaauw, Be-

disiris horon post noktmezo da eksterregionaj samideano (eĉ s-ro Männer restis tiel longe), ĉar ankaŭ por fervojistoj iam venas lasta trajno!

Elisabeth Ritterspach

## Wuppertal

En la kadro de la popolaltlernejo Schwelm/Vestfalia okazos Esperanto-kurso por progresantoj. La kurso komenciĝos merkrede la 16an de septembro 1970 je la 18a kaj duono. La Pestalozzilernejo Schwelm, Lohmannsgasse, situas proksime de la stacidomo. Esperantistoj loĝantaj ekster Schwelm estas nepre dezirindaj por ke la minimuma nombro de kursanaro estu atingata. Ĉiu intereso estas bonvenata! Decente: Anton Kronshage, 583 Schwelm, Eulenberg 5, Tel. 20 24.

goniastraat 2, Zwolle/Nederlando.

**Internaciaj feriaj kursoj Helsingør/Danlando** en la altlernejo de Helsingør inter la 19-a kaj 26-a de julio 1970.

**Internaciaj aŭtunaj feriaj kursoj Arhus/Danlando** en la altlernejo „Junaj hejmoj“ de 18-a ĝis 24-a de oktobro 1970. Por ambaŭ aranĝoj petu aliĝilon ĉe: S-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, DK-8230 Aabyhøj.

**8-a Somera Esperanto-Universitato** de 5-a ĝis 11-a de julio 1970. Interesan programon promesas: Somera Esperanto-Universitato, Gyula, 48-as u. 11./Hungario.

## Erhard Redlich

La 30an de majo forlasis nin, 70jara, Erhard Redlich el Regensburg. Kiel trajnĉefo li entuziasme portis dum multaj deordajaroj la brakrubandon kun la surskribo „ESPE-

RANTO“ sur la uniformo.

Li partoprenis multajn kongresojn kaj estis vigla grupmembro, ĝis, malsanaj kazoĵ ĉesigis sian aktivecon. Dum

longaj jaroj li estis fakdelegito de la naturamikoj. Lia hejmo ofte fariĝis „Esperantujo“, kiam li gastigis esperantistojn en- kaj eksterlandajn.

Li estis vera samideano.





Konrad Tasler

Jam delonge mi interesiĝis pri filatelio. Tial mi serĉis kontakton kun poŝtmark-kolektantoj en aliaj landoj. Sed kiamaniere kompreniĝi kun ili? Ĉu nur per la angla lingvo? Sed mi ja intencis kolekti poŝtmarkojn el la tuta mondo. Do, ĉu ne ekzistas pli taŭga komprenilo? Fine, en la jaro 1952 mi aŭdis la unuan fojon pri Esperanto, kaj baldaŭ mi trovis kontakton kun la loka kaj la fervojista Esperanto-grupoj en Kassel. Post fino de la komenca kurso oni instigis min, viziti internaciajn kongresojn. Tie mi trovis amikojn el diversaj landoj. Kelkaj interrilatoj kompreneble poste „endormiĝis“.

Sed mi trovis novajn interesulojn. Do, vigla korespondado plenigas ankoraŭ hodiaŭ mian liberan tempon.

En la jaro 1960 mi estas elektita kasisto de la fervojista grupo Kassel, kaj post la emeritiĝo de samideano Keil mi akceptis la postenon de distriktkomisiito por la fervoja regiono Kassel.

Ĝis nun mi vizitis 5 IFEF-kongresojn kaj partoprenis multajn aliajn naciajn kaj internaciajn kunvenojn.

## Diversajoj

**Barcelona/Baugé.** Kunlabore kun la Hispana Esperanto-Instituto la hispana flugkompanio IBERIA reklamas per plurkolora faldfolio por karavanaj flugvojaĝoj inter Barcelona kaj Paris kombinitaj de aŭtobusveturoj inter Paris kaj Baugé. Tie troviĝas la vaste konata esperantista kulturdomo Grésillon, kiu ofertas ankaŭ tiujare multvarian kulturan kaj turistan programon. Entute imitinda praktikado de Esperanto por turismaj celoj.

**Ljubljana.** „Esperanta Heroldo“ nomiĝas la dulingva organo de la Esperantomovado en Slovenio. La aspekto plaĉas, la enhavo interesas ankaŭ legantojn eksterlandajn. Apartan atenton meritas la informoj pri la lastjare fondita Internacia Esperanta Ferio-Centro Volparija (IEFC).

**Löhne.** S-ro Hermann Behrmann, la bone konata organizanto de la programita Esperanto-kurso, komunikas la rezultojn de sia ĝisnuna agado. Oni preparas tradukojn de la lernomaterialo en aliajn lingvojn, unue en la anglan. La reklamado en gazetoj kaj reulte postulos ankoraŭ multe da mono. Kiu helpos?

**Ravenna.** „Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj (IABO)“ estas faka kunlaboranta asocio de UEA. Ĝi okupiĝas pri la perioda eldono de la Biblia Revuo kaj de nova ekumena traduko de la biblio. Interesuloj petu la koncernan kompletan adreson pere de la redakcio.

## Prospektoj

Pri la nord-orienta parto de Svislando ekzistas riĉe ilustrita prospekto kun birdrigard-karto kun Esperanto-teksto. Turistoj interesiĝantaj pri svislando ricevas prospektojn de Nordostschweizerische Verkehrs-Vereinigung, CH9001 St. Gallen.

### Darmstadt

El la urbo de nia 14-a jarkunveno estas ricevebla prospekto kun Esperanto-teksto. Germanaj kolegoj petante informojn por eksterlandaj geamikoj skribu nepre germanlingve: Verkehrs- und Werbeamt der Stadt Darmstadt, D-61 Darmstadt.

### Hannover

Kolore ilustrita faldfolio pri la konata urbo. Kun detala stratmapo. Havebla ĉe Trafikoficejo Hannover, Ernst-August-Platz 8, Hannover.

### GEFA-jarkunveno Darmstadt

Ni invitas kore niajn membrojn kaj amikojn en- kaj eksterlande partopreni multnombre nian 14-an jarkunvenon en Darmstadt dum la 9/11a de oktobro 1970.

La preparoj intertempe bone progresas. Darmstadt estas vizitinda urbo apud Odenwald kaj Bergstrasse. Moderna kongresejo kaj ne multekostaj tranoktejoj atendas vin. Reservu tiun semajn-finon!

Eksterlandaj partoprenantoj petu aliĝilojn ekde aŭgusto ĉe la sekretario de la Germana Esperanta Fervojisto Asocio, p. a. de s-ro Rösemann, Generalvertretung der DB, D-45 Osna-brück.

**Antaŭsciigo:** La 23-a IFEF-kongreso okazos de 15a ĝis 21a de majo 1971 en Mari-bor/Jugoslavio.



## Rapidaj vojaĝoj inter Parizo kaj Londono

### Per aerglita ŝipo en 35 minutoj trans la Manikan Kanalon

Jam dum julio 1969 la Britaj Fervojoj malfermis novan servon inter Parizo kaj Londono helpe de tiu moderna trafikilo. Dum oktobro oni baptis la duan veturilon je la nomo „Princess Anne“, same granda kiel la ĝis nun sole trafikanta „Princess Margaret“. Laŭjure ambaŭ estas „aviadiloj“, ne ŝipoj (ĉar ili leviĝas je kelkaj centimetroj super la akvo!) kaj tial la nomo „flugpendigilo“ por la brita „Hovercraft“ uzita en la fakprelego dum la IFEF-kongreso en Stoke-on-Trent eble estis pli ekzakta, sed la praktiko decidis favore al la nomo „aerglita ŝipo“.

Trajno veturigas la pasaĝerojn de Parizo ĝis Buloĝo, kie ili piede post malpli ol 40 metroj atingas la 168 tunojn pezan aerglitan ŝipon. 254 personoj kaj 30 aŭtomobiloj havas lokon sur tiu transportilo (tipo SR N4), kies rapideco estas maksimume 120 km/h, meznombro 75–95 km/h. Post 35 minutoj oni jam atingas en Dover la trajnon al Londono, ĝis tie la tuta vojaĝdaŭro (ek de Parizo) estas 2 horoj 45 minutoj. Rapide proksimiĝas la insulo al la kontinento...

### Francaj Fervojoj (SNCF)

Antaŭ nelonge oni enkondukis „rigidan horaron“ sur la linio Paris-Orléans, la trajnoj trafikas en konstantaj mallongaj intervaloj. Tiu sistemo montriĝis

tre taŭga, kaj ĝi rezultigis tiom konsiderindan trafikplion, ke oni planas ekuzon de la sama horarsistemo ankaŭ sur la linio Thionville-Metz-Nancy.

### Italaj Fervojoj (FS)

Dum la jaro 1970 oni intencas esence plirapidigi la trajntrafikon en Italujo. Por la linioj Roma-Napoli kaj Bologna-Milano la antaŭvidita rapideco estas 150 km/h. En la kadro de tiu grandskala agado la Italaj Statfervojoj projektas novan tipon de TEE-trajno; en la daŭro de du jaroj oni ekuzos 6 tiajn unuojn por la internlanda trafiko. — Novkonstruota rapidrelvojo Firenze-Roma ekfunkcios laŭ la planoj post 5 jaroj. Sur 120 km oni elektis novan mallongigan raŭton, kiu plurfoje kondukos tra tuneloj.

### Aŭtomata kuplilo ek de Pasko 1976

En Usono, Sovetunio kaj Japanio jam kontentige funkcias aŭtomataj kupliloj, nun la evoluo pli kaj pli postulas ankaŭ en Eŭropo la enkondukon de unueca aŭtomata kuplilo precipe por modernigi la manovradon de la varvagonoj.

Je Pasko 1976 dum unu semajno ĉiuj fervojkompanioj apartenantaj al UIC ŝanĝkonstruos ĉiujn varvagonojn uzatajn en translima vartrafiko. Ĉe la ceteraj vagonoj oni instalos la centran pufrokuplilon ĝis 1980. Tiun gravan decidon prenis la ĝeneraldirektoroj de la eŭropaj fervojoj ne nur por modernigi sed ankaŭ kun la espero, grave redukti per tio la nombron

de manovrad-akcidentoj, kiuj okazas precipe ĉe la vagonkuplado.

(Laŭ „Rad und Schiene“ tradukis Ritt)

### 2-a internacia balatona Esperanto-ferio

okazonta de la 17-a ĝis la 30-a de julio 1970 en banloko Balatonszemes / Hungario. Konstanta adreso: Hungara Esperanto-asocio, Budapeŝt VIII, Kenyérmező utca 6.I

### 22. Internationaler Eisenbahner Esperanto-Kongreß

Wegen Platzmangel kann die in deutscher Sprache abgefaßte Rückschau nicht in dieser Ausgabe veröffentlicht werden. Wir bitten die interessierten Leser um Nachsicht und empfehlen, stattdessen die Veröffentlichungen in den Gewerkschafts-Organen und im Sozialblatt der DB zu lesen. Sämtliche Beiträge wurden von Kongreß-Teilnehmern verfaßt.

### Aliaj landoj, aliaj moroj

Kion faras du viroj kaj unu virino, kiuj alordiĝas al soleca insulo? Brito: Ili ne parolas unu kun la alia, ĉar ili oficiale ne reciproke estas prezentitaj.

Italo: Ili sin aranĝas.

Hispano: La viroj sin duelas.

Germano: Unu edziĝas virino, la alia ludas la rolon de civil-registraro.

Franco: La virino edziĝas al unu kaj trompas lin kun la alia.

Ruso: La virino edziĝas tiun, kiun ŝi ne tiom amas, poste ĉiuj tri sidas ĉe la maro kaj funebrias.

Du puloj iras en teatron. Demandas unu la alian: „Ĉu ni piedmarŝu aŭ ni prenu hundon?“

„En la trajno mi ricevis pulon“ diras Max kaj gratas la ŝultron.

„Ne eblas, tute ne eblas“.

„Kial ne?“ „Ĉar estas malpermesite ĉe trajno supren-kaj desalti.“

Kruse

Herausgeber/eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 565 Solingen 11, Meteorstraße 13. Druck / preso: Fränkische Verlagsanstalt und Buchdruckerei GmbH., 8500 Nürnberg. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.